

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str. P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penco.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 penco

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 79 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 januaro 1927

CONGRESS IN RUSSIA.

Labour Esperantists' Visit to Leningrad.

The Sixth Esperanto Congress of Labour opened yesterday in Leningrad, and will continue until Tuesday. This is the first time that the Esperantists in Russia have invited the World Esperanto Congress to their country.

At least 340 internationalists are attending, among them being 30 Labour men and women from England who do not know a word of the Russian language. They will, of course, rely on Esperanto.

The Soviet Government has more than once shown its sympathy towards the world language. Last year it printed postcards with the Esperanto heading Post-karto. Later on it printed a postage stamp with an Esperanto wording in honour of Popov, the inventor of radio (Popov, la inventisto de Radio).

To celebrate the present congress, which is unique in the history of the Esperanto movement, the Soviet Government has printed a postage stamp almost entirely in Esperanto.

The English Esperantists who have decided to spend a holiday in Russia, left London on Saturday last. They will stay through the congress, and will go on to Moscow and Nijni-Novgorod, and then return overland through Berlin to England.

—Daily Herald, London, 7/8/26.

PRI SUGESTIO.

Konduktoro de sibiria vagonaro hazarde estis ŝlosita en malvarmiga viandvagono. Malfermante la alvenintan vagonon oni trovis la viron rigide kuŝantan sur la planko; li estis mortinta. Per kredo li sur la vagonaj muroj estis priskribinta siajn terurajn suferojn pro la malvarmo. Sed je grandega ekmiro oni konstatis, ke la vagona temperaturo estis nepre normala, Ĉar la malvarmiga aparto ne funkciis.

Kaptito estis metata en ejon, kie ĵus virino estis mortinta pro azia holero. Ne sciante pri la fakto li restis sana.

Alia arestito venis en ejon, pri kiu li sciigis, ke ĵus virino tie estis mortinta pro azia holero. Kvankam la sciigo estis mensoga, li troviĝis en tia timo, ke li malsaniĝis sub holeraj simptomoj.

Krimulo estis kondamnita al mortpuno. Oni deklaris al li, ke li pro favoro rajtas morti pere de sango-perdo. Li estas senvestigata, ligata kaj per pinglo pikata en dorso. Samtempe oni fluigas varman akvon super la dorso. Post 40 minutoj la viro estis mortinta.

LA B. E. A. DIPLOMO.

La Vicprezidanto de la Melburna Esperanto Societo (S-ro J. Skurrie) gajnis la diplomon. Koraj gratuleoj.
—(Red.)

NOKTOMEZO.

La urbogardisto direktas forradion en ombroplenajn angulojn Malpleneco! Laŭlonge de nigrecaj stratoj li marŝas peze, kaj la paŝbruo resonas tambure Malpleneco! Li spiras malfacile dum li supreniras la ŝtuparon. Jes, li maljuniga. Kiel knabo kaj viro dum kvardek jaroj li gardas tiun urboparton. Sobra homaĵo li ja estas, kaj Eminjo edzine bonagadas kontraŭ li Li ne povas trovi plendindaĵon en tio. Nenio moviĝas! Ĉio marŝas bone! Sidiĝinte sur keston li bonapetite ekmanĝas grandan ajlan sandviĉon

En publika parko du junaj homoj troviĝas sidante surbenke. Arbfoliaro flustras en milda venteto; unutona klik-klikado de herbinsektoj faras akompanaĵon por la dialogo. Kun sulkigitaj brovoj li mordetas la poleksungon, penas paroli kvazaŭ jam decidiginte, sed finiĝas babilante . . . "Malsaĝulo mi estis, tiel promesi al vi

. Mi ne povis scii, ke ŝi . . . ŝi . . ." Responde knabinaj okuloj perlas lar-me, orkapeto pendas surbrusten, ŝultroj ondas je ŝia plorado silenta. Bela imagmondo de ina estonteco nebule jam forpaliĝis, nur korsoifon lasante

Tie trans la strato oni dancas. Bonŝancaj monulaĵoj! La brila virira vestaro kaj la malhelaj frakoj de la viroj trafas liajn okulojn flirte preterpasante la fenestrojn. Tiujn la sorto ne devigas vivaĉi per la plumknarado, kiel lin " Rapide finu tiun presotaĵon, juna Hudson," aŭdiĝas viveca voĉo. La junulo repreninte elbuŝe morditan plumon denove komencas la skribpenon

Knabino pasas laŭlonge de la strato, malrapide, afekte, en ombrojn fari-tajn de la altaĵoj okulstreĉante. Du viroj alproksimiĝas al ŝi pasante, kaj al ĉiu ŝi flustre parolas. Farinte pronauzan geston, ili formarŝas silente, kaj malespero malheligas ŝiajn okulojn, kvankam rideto ankoraŭ restas ĉe buŝo dum ŝi malaperas malantaŭ murangulo

Lumaĉo de parafina lampo ĵetas malfortan radion tra fumplena atmosfero en postbutika ĉambreto. Aŭdiĝas raŭkaj ekkrioj de viroj duonvoĉe malpacantaj, kaj tintado de moneroj ĵetitaj surplanken

Transmaren el iu juvelita kvazaŭ per rubenoj boateto naĝas ĝisborde kantaĵoj, alttonaj voĉoj, laŭtaj ridoj

. La kolorigita lignopeco ondetiĝas sur la malluma marbrusto kaj pasas rapide tra la nokto. Feliĉa homareto revenas hejmen

El granda multfenestra domo venas ĝemo de virino ploranta. La Morto jam apude pasis al ŝi, forprenante karese en ĝiaj brakoj ŝian amatan

El premaera, malsaniga mansardo en domaĉa kvartalo venas ĝemo de virino ploranta. La Amo apude pasis al ŝi kaj metis buŝeton sur ŝian truston

—Robo, Melbourne.

ESPERANTO AND WIRELESS.

82 broadcasting stations in 22 countries have broadcast courses or lectures in Esperanto. Statistics, which are still incomplete, indicate 660 items of this kind for 30 European stations.

Figures are still lacking for the great stations at Breslau, Prague, Moscow, etc.

Esperanto is more and more perfecting its wireless vocabulary. The well-known French wireless yearbook "Annuaire de la TSF." in the part devoted to vocabularies in several languages, contains an Esperanto section. An English-Esperanto vocabulary has just appeared. Suggestions for similar vocabularies had already appeared in German and Russian.

For some little time a comprehensive wireless organ "Internacia Radio Revuo" entirely arranged in Esperanto, has been issued by the well-known French wireless publishing house of Chiron at Paris.—I.E.S.

SUMMER UNIVERSITY IN ESPERANTO.

During the first week in August university courses in Esperanto were held in the Assembly Hall in Edinburgh. Specialists from various countries lectured in Esperanto on subjects connected with psychology, philology, folklore, etc. Among the professors were Prof. P. Povet, Director of the Institut J. J. Rousseau, Geneva; Prof. W. E. Collinson, of the University of Liverpool; Dr. Fournier d'Albe of the Universities of London and Birmingham; Prof. Bujwid, formerly Rector of the University of Krakow, Poland, etc.—I.E.S.

SENMORTECO.

La maljuna ĝardenisto sidis en la ombroj de elmoda ĉambro. Lia vizaĝo, pala kaj senesprima, iom similis ĝardenon, el kiu la koloro jam forpasis, kaj liaj okuloj rigardis vitre sub la pezaj brovoj tiel same, kiel la malforta lumo de lia dometo, kiu ĉirkaŭfenestre verŝis radion sur la ĉirkaŭstatajn plektobarilon. Ekstere la venontaj skuis bruete la loniceron kontraŭ la fenestrovitron

Dum la tuta vintro li solece vivis sur la altaĵo, kie staris lia dometo. Nur unufoje en jaro la silento rompiĝis. Tio estis, kiam la lakona imbecilo, kostisto suprengrimpis la vojon, ekante la trankvilan ĝardenon per la mensuro de sia nesorbema surtuto, kaj la brueto de la paperaĵoj, kiuj li elstaris el sia leda poŝo. La maljunulo mortas. Tri longajn jarojn li laboris por perfektigi floron el certa speco, kaj nun ĝi staras balancigante sur maldika trunketo en la malgranda kulturita terpeco lia. Ĝi estis bela. Havante formon de giganta kapavo, ĝi estis blanka kiel neĝo, kaj estante en la petalcentro estis sukanta stameno, kovrita de orpolvo. Si tiam apud la malvarmiginta fajro la maljunulo diris al si, "Nu, finfine ĉu ĉi estas la plena rezulto de tiela longa eksperimento? Mi sukcesis atingi penego konata nur de mi eltiri el tiu delikatan gloraĵon el la patrasejo, kaj ĉu scios pri ĝia beleco nur la pasanta vento kaj la apudfluganta birdo, kiu rapidas trans la ĝardenpacon? Morgaŭ la petaloj forfalos, ĝia beleco mortos . . . kaj mi vivis vane." Ekster la domo la floretoj remis pro la venonta nokto. La kandelaro sur la kamenobreto jam brulintis la meĉfino, falis estingite en la ĝardeno da fandiginta sebo. La fajrolumo malplancis sur la brazajoj kaj plenigis la travigintajn vangojn de la maljunulo per kolorriĉeco. Tutan nokton li tie sidis, kaj en la mateno, kiam la sunaj fajroj englitis tra la fenestra kreskaĵo, la fajro jam griziĝis ĝis malvarmo kaj elmondiĝis la ĝardenisto

Muso kuretis trans la cindron

Infaneto malfermis la raston ĝardenpopordon kaj ŝtelatingis la domon. Apud la pordo granda semujo skuis siajn nigrajn globetojn, kvazaŭ estante ŝirpinĉon. Dikaj fingretoj detrunkigis la semojn, disĵetante ilin inter la seka herbaĵo

Kiam venis la printempo, la piedvoĵeto de la dezerta dometo riĉiĝis per cirklo el magiaj blankaj floroj kvazaŭ anĝelo pasante lasis for falisian nubskarpon sur la solecan terspacon.

—Robo, Melbourne.

ESPERANTO AND SHORTHAND.

The great number of Esperanto congresses and meetings is producing an ever growing demand for shorthand writers capable of reporting debates in Esperanto. The increasing use of Esperanto in commerce is creating a good prospect of utilising Esperanto shorthand in practice.

Thus there is a real advantage for stenographers in learning Esperanto.

Adaptations exist of the most diverse systems, such as Pitman' (English) Duploye, Aime-Paris (French) Gabelsberger, National-Stenografie, Roller and Stolze-Schrey (German).

The principal speeches at the last Universal Esperanto Congress in Geneva, which was attended by nearly 1,000 delegates from 38 countries, were taken down according to the adaptation of the Stolze-Schrey system. Esperanto shorthand writers have formed an international inter-systematical association, whose membership is continually increasing.—I.E.S.

ESPERANTO AND TOURING.

It is well known that Esperanto is now extensively applied to touring. A large number of illustrated guide-books in Esperanto have recently appeared (Swiss Federal Railways, Swiss Central Tourist Office, Danzig-Zoppot, Geneva, Wiesbaden, &c.)

It is announced from Berlin, that the great travel agency "Mitteleuropaisches Reiseburo" (M.E.R.) has established a special Esperanto section for the utilisation of Esperanto in touring. The section has its headquarters at the Railway Station "Potsdamer Bahnhof" (Address: Mer 10, Esperanto-Sekcio, Potsdamer Bahnhof, Berlin W.9.)

Further the European time table of Thos. Cook and Son contains a table of usual phrases in Esperanto for the use of travellers.—I.E.S.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata amiko.

En unu el miaj leteroj, ni iomete priskribis la ornitorinkon, nun mi penos doni al vi pli da detaloj, pri tiu tre interesa besto.

Sinjoro H. Burrell, kiu multe studis la vivkondiĉojn de la ornitorinko, baldaŭ publikigos verkon, pri tiu ĉi la plej interesa el ĉiuj mambestoj. Sinjoro Burrell diras, ke la ornitorinko sendube estas eĉ multe pli mirinda, ol oni kutime opinias. Ĝi estas la plej diverskarakteriza mambesto en la mondo. Kvankam nature akvologanto, ĝi tamen povas pereji de malvarmeco, se ĝia felo tro longe restus malseka. Kiam ĝi lasas la akvon, ĝi iras al sia tunelo por sin varmigigi. Ĝi estas tre timema, kaj malŝatas la homan tuŝon, sed kiam kolerigita, la viornitorinko sin defendas kontraŭ sia turmentanto, kaj se eble uzas sian spronon, kiu en certa sezono estas venenhava, kaj povas fari gravan vundon, kaj sinjoro Burrell konsilas al ĉiu esti zorgema, kiam oni tuŝas ornitorinkon.

La ornitorinko fosas du specojn de tuneloj, en unu ĝi loĝas, kaj la alia estas por kaŝi sin, dum ĝi kovas la ovojn. La unua tipo estas simpla, kaj la enirejo ĉiam super la nivelo de la akvo, tamen kelkfoje troviĝas dua enirejo sub akvonivelo. Por patrineca tunelo kvieta aparta loko proksime al la rivero estas elektita, kaj tie la ornitorinko elfosas serpentan tunelon de 8 ĝis 100 futoj da longo. Ĝi finiĝas je la kovejo . . . cirkla kavo, kie en la mallumo la mirindaj mambestidoj elkoviĝas el blankaj ovoj, kaj kuŝas en nesto farita el eŭkaliptaj folioj, pecoj da mola arbeŝelo akvo-herbo, ktp.

Ŝtopiloj estas konstruataj je interspacoj en la tunelo, la lasta proksime al la nestkavo. Tiamaniere protectita la patrino dormetadas dum ŝi kovas ĝis la du aŭ tri idoj aperas.

Ŝajne la subtera kovejo ne estas ventolita. Ĉu do la ornitorinko povas vivi dum longa tempo sen freŝa aero? Estas certe, diras sinjoro Burrell, ke nenia aranĝo estas farita por ventoli la tunelon!

El siaj fruaj observoj pri la ornitorinko sinjoro Burrell konvinkigis, ke la besto, kiam sub akvo, ĉefe uzas la tuŝkapablon; pliposte li supozis la ekziston de sesa sento, funkciante kune kun la tuŝsento, kaj eble origina

kunnaskita eco. Jaroj da sperto konfirmis tiun kredon.

La sentoj de vidado kaj aŭdado, dum la besto estas sub akvo, ŝajne portempe perdiĝas. La eksperimento kriegis dum ornitorinko sub la akvo palpadis ĉirkaŭ liaj manoj, kaj ĝi tute ne montris ian signon de timo. Pri la alia sento, eksperimentoj konvinkis lin, ke vere la ornitorinko povas nek vidi nek flari, kiam ĝi estas sub akvo. Ĝi ŝajne ne gustas nutraĵon, ĝis ĝi atingis la spronon de la akvo, kaj la tuŝsento ankaŭ ne estas tre forta, kiam la besto estas subakvo.

Ni revenas al la sesa sento, kiu ebligas direkton, sen kiu, tiu ĉi tre diverskarakteriza besto ne povas, sinjoro Burrell diras, kolekti vivantaj nutraĵon, kiel ĝi faras ĉiunokte, ĝis la duono da sia propra pezo. En kaptiteco ĝi volante mangas vivajn salikoketojn. En sia natura hejmo ĝi suĉas la vivaĵetojn el la koto.

La Historia Societo de Viktorio, ĵus starigis monokolekton por monumento pro memoro de Johano C. Burke, kiu en 1838 portis la unuan per landan poŝton de Melbourne al Sydney.

Sinjoro Bourke komencis la longan 2 januaro 1838, kun du ĉevaloj, unu por rajdi, la alia por porti la poŝton kaj provizon da nutraĵo por nutri lin dum la danĝerplena entrepreno. La rajdo estis tra lando antaŭe ne vidata de blankhaŭtuloj.

Sinior Bourke komencis la longan vojaĝon sen ia alia gvido aŭ helpo, ol kompasro taje, kaj steloj nokte. Li posedis nevenkeblan kuraĝon, kaj plenan scion pri la sovaĝejo tra kiu li devos iri, sciadon gajnitan post jaroj da sperto, kiel bovkondukisto inter la novaj kolonietoj fonditaj de la fratoj Henty ĉe Portland, kaj Johano Batman ĉe Melbourne. La plej malproksima loko de Melbourne kie sur la vojo li renkontis blankhaŭtulojn estis ĉe rivero Broken, loko kie pliposte la kolonio de blankhaŭtuloj estis ĉiuj mortigitaj de la indiĝenoj.

Januaro en tiu jaro estis eksterordinare varmega. La plimulto el la marĉoj sekigis, arbaraj bruloj estis oftaj, kaj krome estis la ĉiama danĝero morti de manko de nutraĵo aŭ akvo, kaj ankaŭ la danĝero de malamikaj indiĝenoj, multe el kiuj Bourke vidis de malproksime, dum lia soleca rajdo al la rivero Murray.

Dum la longaj tagoj li devis transnaĝi riveretojn kaj riverojn, kiuj fluas

inter li kaj lia celo, kaj nokte li pied-
ligis la du ĉevalojn, tiamaniere ke, se
ili penos forvagi, ili streĉos la ŝnur-
ojn, kiujn li ligis ĉirkaŭ sia propra
korpo. Li preskaŭ dronis, kiam li
transnagis la riveron King, kaj poste
la fumo de la arbaraj bruloj kaj la
preskaŭ netolerebla varmeĝo kaj var-
megaj ventoj, devigis lin halti dum
kelkaj tagoj ĉe la rivero.

Dum li transnaĝis la riveron Mur-
ray li estis minacita de kelkdekoj da
indigenoj, kaj nur liaj mirinda kurajo
kaj rimedpleneco savis lin. En du
okazoj lancoj estis ĵetitaj al li, sed
bonsance ne trovis lin; kaj de tie
gis la plej proksima kolonieto je la
Sydney'a flanko de la rivero Murray
la vojaĝo estis longdaŭra barakto
kontraŭ malbona vetero, soifo, mal-
sato, kaj dormmanko. Fumsignalojn
li ofte vidis sur la montetoj, kioj
montris kiel zorge la indigenoj spiona-
dis lin.

La noktoj estis plenaj je alarmoj,
kaj misteraj sonoj, evidente faritaj de
la indigenoj kun la celo forkuregi la
ĉevalojn.

Lia alveno en Sydney mirigis la
autoritatulojn, kiuj preskaŭ ne povis
kredi, ke tia soleca vojaĝo povus esti
farita de unu sola viro. Bourke estis
tre malforta, kaj la du ĉevaloj pres-
kaŭ skeletoj, sed li plenumis la task-
on.

Kiam Bourke revenis al Melbourne
la civitanoj honoris lin, kiel la Syd-
neyaj civitanoj jam antaŭe faris.

Kun ĉiuj bondeziroj por la Novjaro,
via fidele, P. H.

KURAGIGAJ VORTOJ.

Dear Sir,

The little magazine comes regular-
ly, and I feel very grateful to the
faithful few who give time and money
to enable lovers of Esperanto to have
a magazine of their own in Australia.
I have much pleasure in enclosing

10/-.

Sincerely yours,

M. C. TRUNDLE.

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin
al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR
VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo
facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posta. Memoru
la adreson

EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

KRONIKO.

MELBOURNE. V.— Jam komen-
ciĝis la nova jaro — 1927!
Ĉiu Esperantisto diru al si mem, "Mi
laboros propagandi la karan linkgvon,
mi faros mian eblon ĉi tiun jaron,
interesi aliajn pri ĝi, kaj mi komen-
cos agi tuj." Se ni ĉiuj faros tion,
la Esperanta movado bone progresos!

Dum decembro pasinta, tradukaĵoj,
kaj mallongaj paroladoj plenigis la
programon de la Melburna Esperanto
Societo, kaj ĉe la "Sally McGundy"
kiu akazis je la tria de la monato,
kantoj, deklamoj, kaj ludoj okupis la
vesperon.

Je dec. 4a, sro. Rawson brodkastis
de 3LO, tre interesan paroladon pri
Esperanto.

MELBOURNE. V.—

Malgranda ekskurso al Brighton
estis aranĝita por la Esperantistoj
kaj okazis je dec. 12a.

Ĉe la Australian Church Hall, je
decembro 15a, okazis tre ĝuebla pro-
gramon de kantoj, muziko, kaj tea-
traĵoj, por festi la datrevenon de la
nasktago de Dro. Zamenhof.

AUKLAND, NOVA-ZELANDO. —

Sukceso-plena kaj bonega pikniko
okazis dum 12a de decembro. Aranĝite
de la Aucklanda Esperantista Asocio,
la pikniko estis por festi kaj honorigi
la datrevenon de la nasko-tago de nia
mortinta Majstro, Dro. Zamenhof. Tre
ĝuita tago estis forpasita sur insulo
lokita en la Aucklanda Haveno—In-
sulo Rangitoto—al kie la partoprenan-
toj, post renkonto ĉe la Ĝenerala Poŝ-
toficejo, veturis per boato. Multe da
Aucklandanoj scivoleme rigardadis la
verdan standardon flirtanten ĉe la
pinto de la boatmasto; same tiuj
ŝajnis esti interesataj pri la grupoj de
personoj, kiuj parolis ne-anglan ling-
von. Kvankam la pikniko provizis
ĝuitan kaj memorindan tagon por la
Esperantistoj, ĝi ankaŭ provis esti
bonega praktika propagandilo inter
la urbanoj. Feliĉe, la Aucklanda pub-
liko nun edukigas al nia lingvo kaj
movado; tio estas tre videbla post
senĉesa laboro ĉe la klasoj, per radio,

Specialisto pri Fontanplumoj

kaj per gazetaraj lecionoj kaj propagando.

La nuna prezidanto de la Asocio estas s-ro. J. S. Russell, bone konata kiel malnova pioniro de la movado en Nova Zelando.

Laŭ la vendoj de libroj ĉe Aucklando, Esperanto estas disvastiganta rapide. Dum novembro multaj libroj estis venditaj — enpoŝtigitaj dekkvin—kaj eĉ dudekkvinope. Ne nur Aucklandanoj estas aĉetantoj, sed libroj estas ekspeditaj al ĉiu parto de la lando, eĉ al la plej suda.

Redaktoro, notu bone: kelkaj abonantoj al la Suda Krucio raportas ke la novembra eldono de la gazeto estis tre interesiga kaj sendube ega plibonigo kompare kun la gazeto publikita antaŭ unu jaro. Unu sinjoro diras, "Mi pensas ke la novembra ekzemplero estas la plej bona el ĉiuj. kiujn mi ĝisnune ricevis."

THE POST OFFICE AND ESPERANTO.

Esthonia.

By special decree of 6 May (N.R. 113) the Ministry of Communications (Department of Posts, telegraphs and telephones) of Esthonia recognised Esperanto as a clear language for internal telegrams and for telegrams for Russia.

The Esthonian Department of Posts, telegraphs and telephones has been favorable to Esperanto for some time past. The inscription—Esperanto Farolata—(Esperanto spoken) already appears over a number of counters.—I.E.S.

KION LI TROVIS.

—Ĉu vi memoras tiun beian poŝhorloĝon, kiun mi perdis antaŭ 5 aŭ 6 jaroj? demandis Georgo. —Jes mi bone memoras la okazon—respondis lia amiko. —Ĉu vi memoras, kiel mi ja serĉadis kaj nenie povis trovi ĝin. —Jes mi memoras la diligentan kaj penegan serĉadon.

—Nu do, hieraŭ mi portis malnovan veŝton, kiun mi ne portis jam de kelke da jaroj, kaj kion vi pensas, ke mi trovis en la poŝo?

—Vian poŝhorloĝon, permesu al mi gratuli vin.

—Ne, mi trovis la truon, tra kiuneble ĝi perdiĝis.

WHAT ESPERANTO REVEALS.

Professor on Language Development.

Esperanto as an introduction to the science of language, was the subject of an address by Professor W. E. Collinson, of Liverpool University, at the Universal Congress of Esperantists, in Edinburgh, yesterday.

He said that a careful comparison of the Esperanto vocabulary with the mother tongue would reveal much that was relevant to the consideration of the adequacy of language for expressing thought.

In the Esperanto root vocabulary they obtained a good synoptic view of the chief factors in the development of the great European languages.

Above all, they got to see how many different peoples had from prehistoric times till now made their contribution to the international vocabulary of Europe.

Thus they learned to look upon other nations with more respect and realise the value of co-operation in linguistic, as in more immediately practical matters.

Mrs. Edith Herrnstadt-Oettingen, of Berlin, who won a prize in a Berlin Esperanto competition for having learned Esperanto in eleven lessons, gave an address in which she advocated a scheme for the establishment on the Continent of an exclusive Esperanto theatre. Such a foundation, she said, would probably be the best way to ensure that artists of all countries could build up a common literature in a single language.

Speaking at the congress on the work of the International Labour Office at Geneva, Mr. C. C. Tarelli said that though he would not claim that the Office had created a new heaven and new earth, yet during the seven years of its existence it had proved its necessity and usefulness in securing for several countries the establishment of an eight-hour day, the regulation of night work in industry, and also the regulation of conditions governing the use of white phosphorus and similar dangerous substances. —Daily Herald, London, 7/8/26.

POST TIO.

La longa artefarita tritiktufeto sur la ĉapelo de la fraŭlino lokiĝis horizontale, tiel ke ĝi tiklis la vizaĝon de

la viro, kiu sidis apud ŝi en la tramveturilo, ĝis ĝi fine lokigis kun la pikaĵoj en lian maldekstran oreilon. Post iom da tempo oni rimarkis, ke la viro prenis el lia poŝo grandan poŝtrancilon, kiun li akiris sur sia kala manplato. Ekscite la fraŭlino ekdemandis. —Kial vi faras tion —? —Se tiu tufeto denove eniros mian oreilon—, la viro respondis, —baldaŭ poste estos la rikolto.

LA LINGVOJ EN PERSUJO.

En Persujo diversaj lingvoj estas parolataj, el kiuj unu, la persa, estas la oficiala. Ĝi estas nomata "Faresi." En la regiono Azerbaĝano oni parolas la turkan lingvon, kiu diferencigas de tiu, parolata en Turkujo, tiel, ke nur la kleruloj el ambaŭ landoj povas interkompreni sin.

En Kurdistan, kie la kurdoj loĝas, oni parolas la kurdan lingvon kaj en Ĥozestano, la araban.

Krom tio loĝas en Persujo Armenoj, Hebreoj kaj Asirianoj, kiuj ĉiuj parolas sian propran lingvon.

Kvankam tiu lando estas tre diverslingva, la oficiala persa lingvo regas ĉion. Lernejoj, ĵurnaloj, institucioj uzas ĝin por korespondo, librotenado, reklamo, k. t. p.

Azerbaĝano estis kaj ankoraŭ nuntempe estas la ĉefa parto de Persujo. Oni parolis tie la puran persan lingvon. Sed en la dektria jarcento, la gento Mogul, de tatara deveno, sub Ĝanĝiz-han, venkis la persan reĝon Mahommed Ĥarezussahi kaj ekokupis la regionon. La enloĝantoj estis devigataj paroli turklingve, sed, ĉar tiuj ĉi malame rigardis la venkintojn, ili ne volis tion fari.

La reganto, Halaku-han, nepo de Ĝanĝiz-han, fortranĝis la langon de tiuj, kiuj ne volis paroli turke aŭ li versigis fanditan plumbon en ilian gorgon.

La Moguloj dum 83 jaroj superregis en la lando kaj, dum tiu tempo, ili detruis ĉiujn memoraĵojn de la antikva persa gloro. Ili bruligis bibliotekojn, buĉadis senkompatate kaj faris ĉiajn sovaĝecajn agojn.

Nuntempe la praktika lingvo en Azerbaĝano estas ankoraŭ la turka, sed ĉie ĝi estas anstataŭigata de la persa.

Ali-Akbar Memseĉi, del U.E.A., en Tabriz (Persujo).—el Belga Esperantisto.

TEKNIKO.

Teksaparato sennaveda.

Ĝis nun oni opiniis neŝanĝebla la uzon de navedo kiu, traflugante la interspacon de la varpo, enigis la veŝton. Nun venas nova teksaparato sennaveda kaj alportas al la tuta teksindustrio ŝanĝegon, kies sekvoj ankoraŭ ne estas antaŭvideblaj.

Kiu konas la funkciadon de teksejo, scias, kian gravecon havas la navedo. Ĉi tiu tuta ilaro, kiu koncernas la enigon de la veŝto, nun tute malnecesigas.

Per la nova teksaparato sennaveda la veŝto estas enigata en kiel eble plej simpla maniero.

La aparato laboras malbrue kaj faras 180 irojn en unu minuto; la rezultato estas senmanka teksaĵo. Ankaŭ tre malfortaj veŝtfadenoj ne disŝiriĝas. Ne estas necese malmovigi la aparton kiel je la ŝanĝo de navedoj en ĝisnunaj aparatoj, ĉar la nova aparato teksas "senfine" de grandaj bobenoj, ĝis la tuta varpo estas finlaborita.

La aparato ekmoviĝas el ĉiu pozicio. La rapideco estas tre granda. Ĉe moderna teksilo kun aŭtomata ravedŝanĝo bone ekzercita teksisto povas servi 12 ĝis 16 teksilojn, ĉe la nova teksilo sennaveda nur iom sperta laboristo povas servi 24 teksilojn.

Tre grave estas, ke per la nova aparato ĉiuj krudmaterialoj povas esti teksataj, tute egale ĉu estas lano, kotono, juto aŭ alia materialo, ĉu delikata aŭ maldelikata. La ĝisnunaj aparatoj faras necesaj apartajn aranĝaĵojn en la teksiloj kaj en la navedoj. Tio ne plu estas necesa.

La nova maŝino estas "finita." Ĝi ne plu bezonas provadon kaj eksperimentadon, ĝi jam estas uzata en teksejoj de Sudgermanujo kaj estas konstruata en racia amas-fabrikado. La eltrovito konstruis, provadis, ŝanĝis en fervora laborado dum sep jaroj, ĝis la maŝino montris sian nunan perfektan formon.

Laŭ "Frankfurter Zeitung" de Friedr. Graser.

—el Heroldo de Esperanto.

KIU DIRIS TION AL VI?

Doktoro ekzamenas petanton por asekurado. —Ĉu vi iam estis grave malsana? —Ne. —Ĉu vi iam suferis akcidenton? —Ne. —Vi neniam havis akcidenton? —Neniam, krom antaŭ unu jaro, kiam virbovo ĵetis min super la barilon. —Ĉu vi ne romas tion, akcidento? —Kompreneble ne,— estis la respondo en surprizono. —Li intence faris ĝin.

ESPERANTO AND WIRELESS.

The programme of almost every important wireless station in Europe contains an item in Esperanto. We have already mentioned a number of wireless publications in Esperanto. We may add to the list the journal "Norsk-Radio," the organ of the Oslo station (Norway), which has recently published a technical dictionary of wireless in Norwegian, English and Esperanto.—I.E.S.

TEXTBOOK SCARCITY.

Supplies Now Available.

A large Consignment of Fryer's
"ESPERANTO TEACHER"

just landed. Thirteenth Revised Edition.

Used at 2KY Wireless Station, Sydney.

Societies, Clubs Groups or Individuals can obtain immediate supplies in any quantity from

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY

Box 2710C., G.P.O. SYDNEY.

Cut-rate Prices. Prompt Delivery.

THE INTERNATIONAL INSTITUTE

for Intellectual Co-operation and
Esperanto.

Following the example of the International Labour Office of Geneva, which has for several years possessed an Esperanto press service, the International Institute for Intellectual Co-operation in Paris, an institution connected with the League of Nations, has organised a special information service in Esperanto for the propagation of the ideas of intellectual co-operation.—I.E.S.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon. 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kunveno kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.